

LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO
POR LA

JUNULARO KAJ
KOMENCANTOJ



Redakcio kaj Administrado:
West-Graafdiijk (N.H.)
Nederlando.
Ĝironumero 209354 Nederlando.
Tel. 10

Jarabono:
Nederlando: 0.75 guldeno
Aliaj landoj: 1 guldeno
(1 gld. = 2,1 Sv. fr. aŭ 10 fr. fr.)

LA VIVO SEN MANOJ (FRANTISEK FILIP).

Kiam mi promesis fari radio-paroladon, mi ne pensis, ke tio estos tiel malfacila. Skribi, jes, tio estas farebla, sed skribi ĝin tiel, ke oni efektive konfesas ĉion, kio ŝarĝas la koron, tio estas pli malfacila. Paroli pri si kaj siaj spertoj, tio signifas rememori tre multe da laboro kaj suferado, sed ankaŭ multajn ĝojojn kaj sukcesojn.

Ni dividu la mondon en du grupojn: tiu de la sanaj, normalaj homoj kaj tiu de la korpe difektaj. Ĉiu lama, ĝiba, blinda homo, ĉiu kriplulo vekas ĉe la pli granda parto de la homoj aŭ kompaton pro lia manko, aŭ antipation pro lia nebelaspekto, aŭ fine tedan intereson de neagrabla scivolemo. La homo kun malbela nazo sperdas, ke la homoj unue rigardas ne en liajn okulojn, sed inter ilin, — lian malbelan nazon. Ĉiuj kripluloj penas iel anstataŭi sian mankon. La blindulo anstataŭas la vidpovon per palpado, la senkrurulon helpas apogilo aŭ veturilo. La plej malfacila situacio estas tiu de la senmanulo.

La bela kaj inteligenta ilo de la homa korpo kaj homa agado — la mano — estas io, sen kio vi, normalaj homoj, ne kapablas imagi la vivon. Eĉ nur unu mano estas malmulte por vi. Kaj tamen ekzistas multe da homoj, kiuj revenis de la milito kun nur unu mano kaj al kiuj la restinta mano devas servi por ambaŭ.

Sed la homo, kiu tute ne posedas manojn? Tiu estas ĉe ĉiu vivo dependa de fremda helpo. Kaj tamen ne necesas esti tiel. Ĉiu manko estas grandparte forigebla.

Kaj nun mi do komencas paroli pri mi mem. Mi ŝatus diri hodiaŭ al ĉiuj malfeliĉuloj, ke neniu malfeliĉo estas la plej granda. Kaj al tiuj, kiuj estas tiel feliĉaj, ke ili nenion bezonas anstataŭi, kion

la naturo forgesis ĉe ili, tiu ĉi parolado estu rigardo en mondon ĝis nun nekonatan.

Mi naskiĝis senmana. Mi ne scias, kial la naturo tiel ludis per mi — eĉ la kuracistoj ne scias. Estas io pli potenca ol la homa scio, la povo kaj ludo de la naturo, la Alta Volo.

Certe estis malgaje al mia patrino rigardi la etulon, kiu havis nur kapon, trunkon kaj kruretojn.

Parte per eduko, parte per natura klopodado mi komencis anstataŭi la agojn de manoj per la piedoj. Mi havis grandan bonŝancon, ke mi trovis tre bonan instruiston. Li volis pruvi, ke bona volo kaj ekzercado venkos eĉ la malfavoron de la sorto. Kaj ofte kaj danke mi rememoras la instruiston, sinjoron Cita, kiel li dum multaj monatoj ekzercis kun mi sur la planko, instruante al mi skribadon per la piedoj, ŝetadi ŝtonojn, malfermi pordon, preni en la piedon kuleron, forkon, kaj tranĉilon, tio ne estis la plej malfacila. Sed malfacile estis fari per la piedoj kaj iliaj fingroj la senmezure komplikitan multon da movoj, kiujn postulas la skribado. Kaj tamen mi sukcesis.

La parolad-anoncisto de la ĉi tiea radio-stacio povas diri al vi, kiel mi skribis la tekston de ĉi tiu parolado. Nek per krajono, nek per plumo. Mi skribis ĝin per maŝino, kiel ĉiu alia homo kun manoj. Kompreneble mi skribis per la piedoj, kiuj nun tute anstataŭas ĉe mi la manojn, kiujn mi neniam havis.

Se vi diros, ke tio estas la rezulto de ekzercado kaj klopodado multjara, vi diros nur la eksterajn. La interna sukceso baziĝas sur io alia. Sur tio, ke mi ekkonis la vivon kiel aron da devoj, ke mi ekamis la vivon kaj ke mi volis havi en ĝi egalan lokon, kiel ĉiuj aliaj. Ami kaj voli, tio signifas ĉion. Do, amo kaj volo estis tio, kio anstataŭis miajn manojn. Miaj manikoj pendas malplenaj laŭ mia korpo, sed tamen mi havas miajn manojn, ankaŭ mi honeste vivtenas min, ankaŭ mi laboras.

Mi diras tion kun ĝojo kaj ne kun fanfarono kaj fiero. Mi ne scias nomi ĉion, kion miaj piedoj kapablas, same kiel vi ne scias diri ĉion, kion viaj manoj kapablas. Mi mem manĝas, kompreneble per kulero, kulereto, forko kaj tranĉilo el telero lokita sur la tablo. Mi kombas min per la piedoj, razas min, albutonumas la kolumon kaj ligas la kravaton. Mi pintigas krajonon per poŝtranĉilo, malfermas kaj fermas ĉi tiun. Mi povas plekti korbojn kaj pentri sur ŝtofoj. Mi balaas mem mian ĉambron, ordigas la liton, gladas la pantalonon, muelas kaj kuiras kafon. La piedpilkludon mi kom-

preneble ludis jam kiel malgranda knabo kaj mi havis kontraŭ la sanaj la avantaĝon, ke mi neniam tuŝis la pilkon per la manoj. Bonege mi naĝas kaj direktas aŭtomobilon.


Ĉion per la piedoj, pro ĝojo kaj volo pri la vivo. Ofte estis tre malbone al mi, sed neniam tiom, ke mi rezignus, ke mi ĉesus klopodi pri mia perfektigo. Kaj nun mi diros al vi ion, kio estis mia plej granda venko en la vivo. Tio estis la proponoj de variete-teatraj posedantoj, kiuj promesadis al mi centojn da kronoj por unu sola vespero, se mi konsentus montri min kun miaj kapabloj en cirkoj, amuzejoj kaj variete-teatroj. Sufiĉus, se mi farus sur la scenejo nur tion, kion mi ĉiutage faras hejme. Ligi la kravaton, kombi la „vojeton” sur mia kapo, per la piedfingroj butonumi kaj malbutonumi jakon. Kaj tion mi ne volas kaj neniam volis. Por mi la plej akrobata ago de miaj piedoj estos ĉiam nur tio, kio por vi estas la kutima manlaboro: la devoj ĉiutagaj, la kutima laboro, kiun la vivo postulas de ĉiu homo. En Eŭropo, kaj Ameriko, ĉie, kie mi vojaĝis kiel kantisto (en la grupo de Bakule) kaj kiel lernanto de multaj metioj kaj kiel komercisto, ĉie mi renkontis homojn, kiuj volonte estus pagintaj grandajn sumojn, se ili estus povintaj vidi min ĉe la laboro. Sed multaj, kiuj povus doni al mi la veran laboron, ne donis ĝin. Kaj tamen mi trovis. Kelkaj bonaj homoj helpis min, sed ne pro tio, ke al mi mankas la manoj, sed pro tio, ke mi havis multe da bona volo. Kiam mi finis la popolan kaj mezan lernejojn, mi studis en la komerca lernejo kaj poste mi fariĝis membro de la kantistaro de Bakule. Poste mi fondis la komercon pri art-objektoj. Kaj tiam mi ricevis inviton de iu lernejdirektoro, por viziti lian lernejon. Li havis tie kelkajn sanajn knabojn, kiuj estis mallaboremaj kaj ne volis lerni. Kaj li volis, ke mi diru al ili, kia ĝojo estas en tio, lerni, scii, kaj kapabli eĉ tion, kio ŝajnas unuavide nebla. Kaj tiu ĉi instruista, edukista laboro estis unu el miaj plej grandaj vivĝoj. Poste mi veturadis de unu lernejo al alia, rakontis, instruis, montris kaj ĉie oni ŝatis vidi min. Kiam mi estis skribanta per la piedoj sur la tabulo, regis en la klasoj senspira silento, kio konvinkis min pri granda intereso de miaj malgrandaj aŭskultantoj, kaj ankaŭ pri tio, ke mi staras tie ne kiel kuriozaĵo, priŝtelita de la naturo de siaj manoj, sed — sen fiero dirite — kiel modelo de diligenteco, persisto kaj laboremo. Kaj en tiu ĉi senco mi poste aranĝadis ĉiujn miajn lerneajn vizitojn. Tio estis amikaj interparoloj kun malgrandaj amikoj pri tio, ke la homo kapablas ĉion en la mondo. Oni havu malsukcesojn, suferojn,

malamikojn, malfacilaĵojn; sed la volo, laboro, amo kaj persisto ĝis la plena sukceso ĉion venkos kaj submetos.

Ankaŭ homo senmana povas sin utiligi, ankaŭ homo blinda, surda. Sed li devas havi, aŭ al si mem altrudi tiujn ecojn, kiuj estas la ŝirmo kaj glavo en ĉiuj bataloj. Ĉion vi povas malhavi sur via korpo: la sana sento, la sana, forta volo, ili estas la fundamento de la vivo-feliĉo kaj sukceso.

Ĉeĥo-Slovakio.

Trad. BOZ. VLEKORRE.



La solvo el No. 4.

Ĉar la enigmo estis sufiĉe simpla, ni promesis nur du premiojn.

Jen la nomoj de la gajnintoj:

F.ino A. Bernardi, Geneve, Svisujo

S.ro Cassin, Plouguerneau, Francujo.

Ni jam forsendis la premiojn

Al jenaj personoj ni sendis librojn pro senditaj verkaĵoj:
S.ro J. P. Hulskamp, Alkmaar, Nederlando. S.ro E Hansen, Kōge, Danujo.
F.no A. Barsingerhorn, Koedijk, Nederlando. S.ro Meester, Stompetoren, Nederlando.

NOVA ENIGMO.

Formu el la sekvantaj silaboj II vortojn. La unuaj literoj, legataj de supre-malsupren kaj la triaj legataj de malsupre-supren donas proverbon:

a, a, bi, bo, da, de, e, go, ĝo, i, i, ka, klu, lo, lo, lo, lo, na, naj, no, o, o, re, ri, ro, ro, sa, sa, ste, ta, ti, to, ul:

- | | | |
|-----------------------------|-----------------------------|-------------------|
| 1. Granda domo. | 5. Parto de domo. | 9. Societo. |
| 2. Posteularo. | 6. Malgranda birdo. | 10. Arbo. |
| 3. Malnova mezurilo. | 7. La plej alta perfekteco. | 11. Moka verkaĵo. |
| 4. Pinta, metala bastoneto. | 8. Malsanulejo. | |

Breslau, Germanujo.

ED.PANKALLA.

Inter la sendintoj de la ĝusta solvo ni disdonos kvar premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis la unua de Februaro '36.

LA NOVAJ VESTOJ DE LA REĜO.
(Laŭ la Zamenhofa traduko de fabelo de Andersen)

(Teatraĵo en tri aktoj)

Personoj:

Reĝo	Trezorgardisto	Ceremoniestro
*) Reĝino	Ministro	Du ĉambelanoj
Du trompantoj	Oficisto	*) Du korteganinoj
Lakeo	Ĉeftajloro	Infano, Popolo.

Unua Akto.

(La scenejo prezentas vesto-ĉambron de reĝo. Ĉe unu vando de la ĉambro pendas kurtenoj, post kiuj estas la vestoj de la reĝo. Sur la dua vando pendas granda spegulo, ankaŭ necesas larĝa fenestro kun kurtenoj. En la mezo de la ĉambro staras tablo kun kelkaj komfortaj seĝoj. Sur la tablo kuŝas dika katalogo.

Ĉe la komenco de la unua akto la reĝo sidas profunde meditante ĉe la tablo).

Reĝo: Denove pasis tago, plena de zorgoj kaj penoj. Sed al ĉi tiu laca kapo la nokto ne alportos ripozon Multaj reĝoj naskiĝis kaj mortis De kelkaj oni eĉ ne memoras la nomojn, aliaj restas en la memoro de la homaro dum multaj jarcentoj Ankoraŭ nuntempe oni gloras Salomo'n pro lia saĝeco, Cezaro'n pro lia potenco. Kelkaj estas famaj pro nobleco, aliaj pro justeco, sed min oni post mil jaroj ankoraŭ memoros kiel la luks-amanton. Jam nun oni nomas min „La Ĉiam Bele Vestita”. — Sed kiajn devojn ĉi tiu nomo metas sur min! Ĉiutage mi almenaŭ dufoje devas interkonsiliĝi kun mia ĉeftajloro por farigi al mi novajn vestojn, kiuj havigos al mi novan pompon kaj brilon. — La plej malriĉa laboristo, en siaj eluzitaj vestoj, vivas kompare kun mi, kviete kaj senzorge. Sed mi ne perdiĝu en meditado — nova tasko atendas min! Post tri tagoj ja estos la plej brila tago el mia vivo! Tiam okazos la granda parado, honore de la vizito de la persa reĝo!

Do *(decideme. Li sonorigas. Aperas lakeo).*

Lakeo (riverencante): Via Reĝa Moŝto deziras?

Reĝo: Alvoku tuj la reĝan ĉeftajloron! Tuj!

Lakeo (riverencante): Okazos laŭ Via deziro, Reĝa Moŝto *(foriras)*.

(Post momento iu frapas la pordon; aperas la ĉeftajloro).

Ĉeftajloro (riverencante): Via Reĝa Moŝto venigis min?

Reĝo (severe): Mi urĝe bezonas novan veston. Pli bela kaj pli multekosta ol iu ajn vesto sur la mondo. Ĉu vi povas fari tion en tri tagoj?

Ĉeftajloro: Via Moŝto pardonu min, sed tio ne eblas. Mi devas elekti desegnon, kaj

*) (La reĝinon kaj korteganinojn vi povas ellasi el la teatraĵo).

Reĝo (kolere): Malaperu! Mi ne plu toleras vin en mia proksimeco!

Tajloro: Sed Via

Reĝo: Foriru malsaĝulo! (*La ĉeftajloro silente riverencas kaj malaperas*).

Reĝo (irante tien kaj reen en la ĉambro): Ho, kiom malfeliĉa mi estas!

Kiom da zorgoj pezas sur miaj ŝultroj! Baldaŭ estos la grandioza festotago, kaj mi ne havas taŭgan veston! Mi, la potenca reĝo, kiu estas fama en la tuta mondo pro siaj belegaj vestoj kaj alta gusto! Ho, kion fari! Mi estas senespera! Ho, kiom signifas la zorgoj de tuta popolo mia, kompare kun miaj! (*Li metas la manojn sur la okulojn*). Sed mi venigos mian edzinon! Eble ŝi povos doni saĝan konsilon. (*sonorigas*) Ho, kiom malfacila estas la vivo de serioza reĝo! (*aperas lakeo*).

Lakeo (riverencante): Via Moŝto deziras?

Reĝo: Mi deziras, ke vi konduku al Mi Ŝian Moŝton la Reĝinon.

Lakeo: Je Via servo, Moŝto. (*riverencas kaj foriras*).

Reĝo (foliumante en la dika libro, kio kuŝas sur la tablo): Jam milfoje mi trarigardis mian vestkatalogon, sed vane! (*legas duonvoĉe*): La ermena surtuto kun longa pantalone — ne, ĝi ne taŭgas. La brokata kostumo — tiu estas tre bela, sed jam kelkfoje mi surhavis ĝin! La nigra kun arĝenta vesperkostumo, la brokata surtuto kun blanka, velura pantalone. La ruĝa mantelo kun oraj randoj, la nigra velura kostumo, kovrita per arĝentaj steloj — ĝi ja estas tre eleganta — sed por la parada festo ĝi certe ne decas! (*Sur la scenejon venas lakeo, post li la reĝino kun du korteganoj; oni riverencas antaŭ la reĝo, la lakeo tuj reiras, la reĝo stariĝas, salutas la reĝinon kaj sidigas ŝin ĉe la tablo*).

Reĝino (al la du sinjorinoj): Volu reiri al viaj ĉambroj. Mi deziras esti sola kun Lia Reĝa Moŝto.

Du sinjorinoj (riverencante): Laŭ Via deziro, Via Moŝto (*for*).

Reĝino: Plaĉis al vi paroli kun mi?

Reĝo: Jes, Via Reĝa edzo profunde suferas.

Reĝino: Ĉu mi humile rajtas peti la kaŭzon de tiu sufero?

Reĝo: Vi ja scias, ke baldaŭ okazos la granda parada festo! Kaj tiu festo jam kaŭzis al mi maldorman nokton.

Reĝino: Sed Mia Edzo, kiel povas okazi! Kial Vi timas tiun feston?

Reĝo: Ah, kiom malmulte Vi komprenas pri miaj zorgoj! Mi ja ne havas konvenan veston por tiu tago!

Reĝino: Tiukaze mi konsilus al Vi trarigardi Vian vestkatalogon! Ĝi ja estas sufiĉe ampleksa!

Reĝo: Sed Vi ja povus kompreni, ke mi jam faris tion! Vane, ĉio estis vana! Je mia digno decas nova kostumo! *Iu frapas, aperas lakeo*).

Reĝino: Tiukaze ŝajnas al mi, ke Vi bezonas ne min, sed Vian Ĉeftajloron!

Reĝo: Ankaŭ tiun mi jam venigis, sed mankas al li tempo!

Reĝino (post iom da pripensado): Eble mi scius konsilon

Reĝo: Ho, diru ĝin, mi petas!

Reĝino: Via Moŝto igu kri-anonci tra la tuta urbo, ke tiu tajloro, kiu kapa-

blas farigi al la reĝo novan veston en tri tagoj, ricevos altan rekompencan kaj la kavaliran krucon.

Reĝo: Tion mi povus provi! (*Oni frapas, envenas lakeo*) Vi kuraĝas ĝeni min!

Lakeo (riverencante): Via Reĝa Moŝto pardonu min! Sed estas du sinjoroj, kiuj deziras paroli al Via Moŝto!

Reĝo: Momente Mia Reĝa koro estas tro ĉagrena! Mi ne deziras esti ĝenata!

Lakeo: Sed Via Moŝto, ŝajnas tamen, ke ili havas urĝan sciigon por Vi!

Reĝo: Nu, estu tiel! Venigu ilin! (*La lakeo riverencante eliras; post momento aperas du strange vestitaj personoj, trriverencante*).

Reĝo: Kiu sendis vin en mian palacon?

Unua trompanto: Via Altega Moŝtego! Ni estas mondfamaj tajloroj. (*al sia kunulo*): Ĉu ne? Ni ĉiam laboras por reĝoj kaj grafoj. Ni ja ne estas ordinaraj homoj, sed sorĉistoj! Ni teksas la plej belan ŝtofon, kiun oni nur povas al si prezenti. Kaj ne sole la koloroj kaj desegnoj de tiu ĉi ŝtofo estas eksterordinare belaj, sed la vestoj, kiujn oni preparas el tiu ŝtofo havas la mirindan econ, ke al ĉiu, kiu ne taŭgas por sia ofico aŭ estas tro malsaĝa, ili restas nevideblaj! (*Li triumfante ĉirkaŭrigardas*).

Reĝo (tre ĝoja, flanken): Tio ĉi ja estus bonegaj vestoj! Havante tian surtuton, mi povus sciigi, kiu en mia regno ne taŭgas por sia ofico aŭ estas tro malsaĝa. Mi povus diferencigi la saĝajn de la malsaĝaj! (*Al la trompantoj*): Jes, la ŝtofo devas tuj esti teksata por mi! Mi donos al vi riĉan rekompencan, se vi en tri tagoj preparos por mi veston el tia ŝtofo. Se vi ne povos plenumi mian deziron, mi pendigos vin! (*La du trompantoj iom interparolas*).

Unua trompanto (riverencante): Via altega Moŝtego, ni akceptas. Ni laboros tage kaj nokte por kontentigi Vian Moŝtegon! (*La reĝo skribas ion sur paper-folion*).

Reĝo (legante): Donu tuj al ĉi tiuj du sinjoroj tiom de la plej delikata silko, oro kaj arĝento, kiom ili juĝas necesa por mia nova vesto. (*transdonante al la trompantoj la paperon*): Enmanigu ĉi tiun leteron al mia reĝa trezorgardisto, kaj komencu baldaŭ vian laboron! (*La du trompantoj riverencante forlasas la scenejon*).

Dua Akto.

(*La scenejo estas la sama ĉambro, sed nun staras en ĝi du teksiloj. La du trompantoj sidas malantaŭ la malplenaj teksiloj*).

Unua trompanto (laŭte ridante): Ha, ha! Jen ni havas bonegan vivon! Ni jam dum du tagoj estas ĉi tie, abunde manĝante kaj trinkante, kaj farante nenion! Ha, ha, ha!

Dua trompanto (montrante keston, kiu staras en angulo de la ĉambro): Kaj krom tio ni plenigas nian keston per multaj valoraĵoj! Ho, mi deziras danci pro ĝojo! (*Li stariĝas, ĉirkaŭbrakas la alian*,

kaj kune ili saltas tra la ĉambro. — Subite malfermiĝas la pordo kaj aperas lakeo).

Lakeo (tre mirigita): Kion vi faras?

Unua trompanto: Ho, ni iom plilongigas la ŝtofon. Kion vi diras pri ĝi? Ĉu plaĉas al vi la koloroj?

Lakeo (balbutante): Ho jes, tre, tre

Unua trompanto: Sed ni jam tiom longe streĉe laboris, ke ni sopiras al iom da freŝa aero! (*Al la dua trompanto*): Helpu min, ni tre sin-garde formetos la teksaĵon dum momento. Atentu, estu do singarda! La ŝtofo estas tiom multekosta!

(*Ili kvazaŭe metas la ŝtofon en la keston, kiun ili ŝlosas. La lakeo nenion-vidanta aspektas tre konsternita. La trompantoj forlasas la scenejon, sekvataj de la lakeo. Momenton poste aperas la reĝo*).

Reĝo (diras al si mem): Mi volus scii, kiom da ŝtofo ili jam teksis! Sed tamen mi iomete timas, pripensante, ke tiu, kiu estas malsaĝa, aŭ ne taŭgas por sia ofico, ne povas vidi la ŝtofon! (*ĉirkaŭrigardante*). Ŝajnas tamen, ke la tajloroj kaŝis la ŝtofon! Ĉar kompreneble mi ne bezonas timi, mi certe povos vidi ĝin! Sed eble estas tamen pli bone, ke mi antaŭe sendu alian personon, por vidi kiel statas la afero! Kiam la tajloroj estos revenintaj, mi sendos al ili mian plej maljunan honestan ministron! Li certe plej bone raportos al mi, kiel aspektas la ŝtofo, ĉar li estas homo saĝa, kaj neniu taŭgas pli bone por sia ofico ol li! Sed mi foriru! Tuj revenos la teksistoj! (*Li forlasas la scenejon, kaj la trompantoj reaperas. Ili komferte sidiĝas malantaŭ la malplenaj teksiloj*).

Unua trompanto (moke): Nun ni povas denove komenci labori!

Dua trompanto: Aŭskultu! Venas iu! Faru, kvazaŭ ni laboregas! (*Envenas la maljuna ministro*).

Ministro: Mi estas la plej maljuna ministro de Lia Moŝto la reĝo. Plaĉis al Lia Moŝto sendi min ĉi tien, por sciiĝi pri la teksado! Bonvolu do montri al mi la ŝtofon! (*fluŝtrante al si*): Dio helpu al mi! (*larĝe malfermante la okulojn*): Mi vidas nenion!

Unua trompanto: Ho, tre volonte, Sinjoro! Vidu nur! Alvenu pli proksimen! Ĉu ne estas bela desegno kaj belaj koloroj? (*montrante al la malplenaj teksiloj*).

(*La ministro iom proksimiĝas, purigante al si la okulvitrojn*).

Ministro (flanken): Ho ve, mi kompatindulo! Mi vidas nenion! Ĉu mi estas tiom malsaĝa? Tion mi neniam supozis, kaj tion neniu sciiĝu! Ĉu mi ne taŭgas por mia ofico? Ne, neniel mi povos rakonti, ke mi ne vidas la teksaĵon!

Dua trompanto: Nu, vi ja nenion diras?

Ministro (laŭte): Ho, ĝi estas bonega! Tre ĉarma! Tiu desegno kaj ĉi tiuj koloroj! Jes, mi ĉion raportos al la reĝo, ke ĝi tre al mi plaĉas!

Ambaŭ trompantoj: Tre agrable al ni, alta sinjoro!

Dua trompanto: Vidu la kolorojn. Ili similas al la ĉielarko. Kaj atente observu la miraklan, neordinaran desegnon. Ĉio estas originala! (*La ministro atente aŭskultas*).

Unua trompanto: Bonvolu diri al la Reĝa Moŝto, ke Li baldaŭ havigu al ni pli da silko kaj oro, kion ni ĉiam ankoraŭ bezonas por la teksaĵo. (*La ministro foriras. Ili daŭrigas la laboron super la malplenaj teksiloj. Post kelka tempo envenas la trezorgardisto, grava, digna persono.*)

Trezorgardisto: Lia Reĝa Moŝto sendis min al vi, por havigi al vi silkon kaj oron. (*Li transdonas al ili silkon, orfadenojn kaj dikan monujon.*) Samtempe mi dezirus vidi, kio estiĝis el la multego da silko kaj oro, kion mi jam alportis al vi. Sajnas, ke la kostumo fariĝos eksterordinare multekosta! Vi jam postulis kapitalon por prepari ĝin!

Ambaŭ trompantoj: Sed Vi ja ne kredu, ke ni metis la oron kaj arĝenton en niajn propajn poŝojn!

Unua trompanto: Volu nur iom proksimiĝi, por ke vi proprokule konvinkigu!

Dua trompanto: Vidu nur la amason da ŝtofo, kiun ni jam teksis!

La trezorgardisto (flanken): Terure, mi vidas oron nek silkon!

Ĉu mi estas tiom malsaĝa? (*li iom proksimiĝas*) Sed mi tamen raportos al la reĝo, ke la teksaĵo havas mian plenan aprobon! (*laŭte*): Ah, jes, efektive, ĝi estas belega! Jes — certe. Mi raportos tion al la reĝo! (*foriras*).

(*La trompantoj faras grimacojn post li; ili zorge ŝlosas la pordon, rigardas tra la fenestro, ĉu neniu estas proksime, malfermas la monujon, nombras kaj nombras, levas la monon supren kaj faligas ĝin sur la tablon. Frotas la manojn kaj dancas. Subite ili aŭdas paŝojn, rapide metas la monon ktp. en la keston, kaj kun gravaj mienoj sidiĝas post la teksilojn. Iu frapas la pordon.*)

Ambaŭ trompantoj: Envenu, envenu. (*Alia oficisto envenas*).

Oficisto: La Reĝa Moŝto sendis min, por vidi, kiel iras la teksado, kaj ĉu la ŝtofo baldaŭ estos preta (*Li rigardas kaj rigardas*).

Ambaŭ trompantoj: Ne vere, ĝi estas bela peco da ŝtofo? (*Ili denove montras kaj klarigas la belan desegnon*).

Oficisto (flanken): Malsaĝa mi ja ne estas! Tial sekve mi ne taŭgas por mia bona ofico. Tio ĉi estas stranga. Sed almenaŭ mi ne devas tion ĉi lasi rimarki (*laŭte*): Belega, belega! Ion tian mi neniam vidis! La koloroj kaj la bonega desegno ravigas la okulojn. Mi rapidos al la reĝo por rakonti la miraklon!

(*Li foriras. — Post momento venas le reĝo kun sekvantaro: i.a. la ministro, la oficisto.*)

La ministro: Nu, kion diras Via Reĝo Moŝto? Ĉu tio ĉi ne estas efektive belega? Via Reĝa Moŝto nur admiru, kia desegno, kiaj koloroj! Jen la oraj fadenoj, sur la nigraj figuroj. Ĉu ĝi ne estas rava?

La reĝo (flanken): Kio tio ĉi estas! Mi ja nenion vidas! Tio ĉi estas ja terura! Ĉu mi estas malsaĝa? Ĉu mi ne taŭgas kiel reĝo? Tio ĉi estus la plej terura, kio povus al mi okazi! (*Tre laŭte*):

Ho, ĝi estas tre bela, ĝi havas mian plej altan aprobon! (*Li balancas kontente la kapon kaj observas la malplenajn teksilojn. La tuta sekvantaro rigardas kaj rigardas.*)

La sekvantaro: Ho, ĝi ja estas tre bela!

Unu el la sekvantaro: Via Reĝa Moŝto portu ĉi tiujn belegajn vestojn el tiu ĉi belega materialo la unuan fojon ĉe la solena festo.

Ĉiuj, (unu post la alia): Rava, belega, mirinda, delikata!

Reĝo: Miaj sinjoroj, vi meritas ĉian laŭdon, mi donacas al vi kavaliran krucon, kaj la titolon de sekretaj teksistoj de la kortego.

Dua trompanto: (Riverencante): Koran dankon, Via Altega Reĝa Moŝtego. La tutan nokton antaŭ la tago de la granda parado ni pasigos maldorme. Volu nur havigi al ni multajn kandelojn por bruligi kaj ne forgesu alportigi du kudromaŝinojn. *(Ili faras, kvazaŭ ili prenas la ŝtofon de la teksiloj, tranĉas per grandaj tondiloj en la aero. La reĝo kun sia sekvantaro foriras. La trompantoj denove ekdancas.*

Tria Akto.

(La scenejo estas la sama ĉambro, kiel en la dua akto. La du trompantoj sidas post malplenaj kudromaŝinoj. Ili sidas komferte, nelaborante).

Unua trompanto (sin etendante): La manĝaĵo estis hodiaŭ eksterordinare bongusta!

Dua trompanto: Jes, ankaŭ al mi tre plaĉis. Ĉu ne estus eble, ke ni iom plilongigu nian restadon ĉi tie?

Unua trompanto: Ne, ne, tio ne eblas. Hodiaŭ estas nia lasta tago en la palaco. *(ĉagrene):* Ah, kiom mi bedaŭras!" *(Momenton ambaŭ silentas).*

Unua trompanto: Mi ĵus pensis: kiom strangaj aferoj okazas en la mondo! Ekzemple, en ĉi tiu palaco loĝas reĝo, kiu estas tiom stulta, ke li lasas sin trompi de du migrantoj, kiel ni. Tamen milionoj da homoj admiras kaj honoras lin! Kaj nin, kiuj ja superruzis la reĝon, nin oni malestimas!

Dua trompanto: Mi neniam komprenis tiajn aferojn, sed mi meditis, kie ni estos morgaŭ!

Unua trompanto: Ho, ne cerbumu! Ni ja kolektis tiom da oro kaj arĝento, ke ni povos mallabori eĉ dum kelkaj jaroj! La mal-facilaĵo nur estas: kiel ni ne rimarkite malaperos de la scenejo! Ni ja devos esti for, antaŭ ol oni malkovros nian trompon. Alie oni certe tuj malliberigus nin!

Dua trompanto (timigita): Ho, ne parolu pri la malliberejo. Ni tuj fuĝu!

Unua trompanto: Ho, vi stultulo! Ni ja trovos iun solvon *(li gratas sian kapon):* Mi jam scias; kiam la reĝo surhavas *(ambaŭ malice ridetas)* sian belan veston, li certe observos sin en la spegulo, kaj la sekvantaro nur atentos lin. Tiun momenton ni uzos por foriri. *(montrante al la kesto):* Ni kunportos nian keston, ekstere ni saltas sur iun veturilon, kaj rrrr, ni jam estos malproksime, antaŭ ol iu rimarkis! Sed laboru, venas iu! *(Venas lakeo).*

Lakeo: Lia Reĝa Moŝto ordonis min informiĝi pri la nova vesto de Lia Moŝto. Lia Moŝto estas deziranta ĝin vidi.

Unua trompanto: Ankoraŭ momenton, alta sinjoro. (*montrante sur la tablon*); Ĉu vi vidas ĉi tiujn belajn orajn butonojn? Tiujn mi ankoraŭ devas kudri al la pantalone de Lia Reĝa Moŝto. Post momento ni estas pretaj. — Vi intertempe jam alkonduku la reĝon, por ke ni mem vestu lian Moŝtegon. (*Lakeo for*).

Unua trompanto (al la dua): Vi do bone komprenis? Tuj kiam la reĝo staras antaŭ la spegulo, vi helpu min forporti nian keston.

Dua trompanto (malice): Mi vere estas tre scivola vidi la reĝon, vestitan en sia nevidebla vesto!!! (*Aperas la reĝo kun sia sekvantaro*).

Reĝo (flanken): Ho, kiom batas mia koro! Ĉu mi povos vidi?

(*laŭte*): Mi tuj deziras surmeti mian novan veston. (*montrante al la fenestro*): Ekstere jam atendas mia popolo, por admiri min!

Ambaŭ trompantoj (riverencante): Ho, Via Moŝtego, okazos laŭ Via Alta Volo!!

Unua trompanto: Via Moŝtego nur bonolu vidi! Espereble nia teksaĵo plaĉos al Viaj Reĝaj okuloj. (*Li levas unu manon supren, kvazaŭ ion montrante*): Jen estas la surtuto! Ĉu ĝi ne belaspektas? La butonoj estas el pura oro, kaj ni kudris ilin per arĝentaj fadenoj!

Dua trompanto (kvazaŭ ion montrante): Kaj jen estas la pantalone! Via Moŝtego bonvolu vidi, kiom arte aspektas la figuroj sur la pantalone! Jen la mantelo! Ĝi estas tiel malpeza, kiel araneaĵo! Oni povus pensi, ke oni nenion portas sur la korpo, sed tio ĉi estas ja la plej grava eco.

Reĝo: Kiel belega mi estos!

Ĉiuj korteganoj: Belega, arta, kiom belaj figuroj, (*ktp*).

Unua trompanto: Via Reĝa Moŝto nun volu plej afable demeti Viajn plej altajn vestojn, kaj ni al Via Reĝa Moŝto tie ĉi, antaŭ la spegulo vestos la novajn. (*La reĝo demetas siajn vestojn kaj la trompantoj faras kvazaŭ ili vestas al li ĉiujn pecojn de la nova vesto. Kaj ili prenas lin per la koksoj kaj faras, kvazaŭ ili ion alligas*).

Unu el la trompantoj: Tio ĉi estas la trenaĵo de la vesto.

(*La reĝo turnas kaj turnas sin antaŭ la spegulo*).

Reĝo: Mi estas tiel bela, tiel belega!

Ĉiuj: Kiel belege ili aspektas, kiel bonege ili sidas. Kia desegno, kiaj koloroj. Ĝi estas vesto de granda indo. (*lu frapas; aperas ĉefa ceremoniestro*).

Ĉefa ceremoniestro (raportante): Sur la strato oni staras kun la baldakeno, kiun oni portas super Via Reĝa Moŝto en la parada irado!

Reĝo: Nu, mi estas en ordo! Ĉu ĝi ne bone sidas? (*ankoraŭ unu fojon li turnas sin antaŭ la spegulo, ĉar li volas montri, ke li kvazaŭ bone observas sian ornamon. Intertempe la du trompantoj ekprenas la keston kaj ŝteliras for. Ekstere oni aŭdas la bruadon de la popolo*).

Reĝo: Oni levu mian trenaĵon! (*Du ĉambelanoj etendas la manojn al la planko, kvazaŭ ili levas la trenaĵon. Ili iras kaj tenas la manojn etenditaj en la aero*).

Reĝo: Nun oni malfermu la kurtenojn, por ke mia amata popolo tuj admiru mian novan veston. (*Oni malfermas la kurtenojn kaj malantaŭ la fenestro estas videbla la popolo*).

Popolo: Ho, ĉielo, kiel senkomparaj estas la novaj vestoj de la reĝo! Kian belegan trenaĵon li havas al la surtuto. Kiel bonege ĉio sidas! Belega, belega! Vivu la reĝo! Vivu la reĝo (*Subite alproksimiĝas malgranda infano, kiu krias per laŭta voĉo*).

Infano (kriante): Li ja estas tute ne vestita!!!

Voĉo el la popolo: Ho, ĉielo, aŭdu la voĉon de la senkulpeco!

Alia voĉo el la popolo: Kion la infano diras?

Unua voĉo: Li estas tute ne vestita! Tie staras malgranda infano, kiu diras, ke li tute ne estas vestita! (*Momenton estas silente. Tiam granda bruoj*).

La popolo (kriante): Li ja tute ne estas vestita, li ja tute ne estas vestita! (*Oni krias kaj fajfas*).

Reĝo (flanken): Ho, mi timas, ke ili pravas. Oni certe trompis min. Sed mi restu kuraĝa. (*laŭte*): Oni fermu la kurtenojn! Plaĉas al mi foriri (*li fiere forlasas la scenejon, kun sia sekvantaro*).

Ĉiuj rajtoj estas rezervitaj. Per aĉeto de 8 ekz. (po f 0,15) oni akiras la prezentraĵon.

KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

La esperantistaj grupoj en jenaj lokoj enkondukis „La Juna Vivo“:

Ĉeĥoslovakujo: Hluk.

Danujo: Erslev (dua jaro).

Francujo: Buxières d'Aillac (dua jaro).

Hispanujo: Terrassa.

Nederlando: Castricum (komenckurso), Limmen (komenckurso), Hindeopen (komenckurso por lernej-infanoj), Haarlem (infankurso, dua jaro), Rotterdam (infankurso, dua jaro), Benningbroek (infankurso, dua jaro), Midden-Beemster (dua jaro), Delft (infankurso, dua jaro), Breezand (dua jaro), Sybrandaburen (daŭrigkurso).

Svedujo: Ljugarn (dua jaro).

KORESPONDADO.

Ricevita mono: Matthieu f 24,80. Karlsson f 12,31.

J. W. en H. (Ned.), F. A. R. en A. (Port.), S. N. en T. (Jap.), M. en N. (Franc.), F. en B. a. M. (Aŭstr.), T. en S. (Ned.), B. E. en H. (Ned.), G. K. en D. (Germ.), G. en D. (Germ.), A. en P. (Franc.), N. en L. (Angl.), C. v. T. en A. (Ned.), F. en L. (Franc.): Viaj rakontoj nur parte kontentigas min.

F. B. en A. (Ned.), S. en A. (Belg.), V. en H. (Ned.): Mi juĝas la fabelojn ne konvenaj nor niaj legantoj. Pripensu, ke „La Juna Vivo“ estas destinita por 12—16 jaraj infanoj. Krome ni devas zorgi, ke la enhavo ankaŭ interesas al plenaĝuloj.

Ĉiu, kiu nun abonas „La Juna Vivo“ ricevos senpage la decembran numeron.

Por Komencantoj.

LA BIRDOJ EN NIAJ ĜARDENOJ.

En Nederlando ni havas multajn paruo-specojn, sed en niaj ĝardenoj aperas precipe nur la granda kaj blua paruoj. Somere ĉi tiuj vivas en la arbaroj, kie la birdetoj estas tre utilaj, ĉar ili manĝas insektojn. Kiam la vintro alproksimiĝas, la paruoj venas en niajn ĝardenojn, ĉar en la arbaroj ili ne trovas sufiĉan nutraĵon. Ili tre ŝatas oleo-nuksojn, pro la graso.

Se oni sur-fadenigas la nuksojn kaj pendigas ilin sur arbobranĉo, oni baldaŭ vidos la paruojn. Fikse tenante la nuksojn per la ungetoj, la bestetoj tiom longe bekpikas la ŝelon, ĝis ili povas eltiri la kernon. Vidu, kiel lerte la malgrandaj akrobatoj grimpas laŭlonge de la ŝnureto por esplori, kiun nukson ili plej facile povas rompi! Plejofte la paruoj venas duope: la virparuo kaj ĝia edzineto tiuokaze helpas unu la alian. Dum unu pendas sur la nuksoj, la alia restas tuj apud ĝi, bone atentante, ĉu ne minacas danĝero. Tuj, kiam la unua havas sian kaptaĵon, la alia kiel eble plej rapide ekpendas sur la nutraĵo, kaj baldaŭ ĝi sekvas sian kunulon.

Iam, dum severa vintro, granda paruo uzis kiel tranoktejon nestkesteton, kiu pendis en mia ĝardeno kontraŭ arbotrunko. Dumtage ĝi de tempo' al tempo eniris la kesteton, eble por esplori, ĉu ĉio estas en ordo, sed ĝi restis nur momenton interne, kaj tuj forflugis. Iun tagon falis multa neĝo kaj ĉirkaŭ la kvara vespere mi aŭdis akrajn kriojn el la arbo kun la nesteto. Mi iris en la ĝardenon kaj trovis mian parumon sur branĉo; laŭte kriante ĝi flugis de branĉo al branĉo kaj evidente ĝi volis tiri mian atenton. Proksimiĝante mi vidis, ke la eniro de la kesteto estas tute fermita de la neĝo: la birdeto ne povis eniri. Singarde mi per la mano forprenis la neĝon kaj zorgis pri tio, ke la neĝo ne falu en la neston. Dume la paruo restis tuj apud mi, observante mian laboron, kiu baldaŭ estis preta. Mi iris iom malantaŭen, kaj kun ĝoja dankkrio la birdeto eniris sian dormejon.

Interese, ĉu ne, ke tia malgranda birdo vokis min por helpo!

Wassenaar, Nederlando.

A. E. S. M.

La redakcio urĝe petas al la eksterlandaj legantoj baldaŭ pagi la jarabonon (1 Julio '35—1 Julio '36) al la peranto en ilia lando. (Vidu paĝon 96).

TRI KNABINETOJ. (UJAKA AKITA)

Antaŭ ĉirkaŭ trimil jaroj en Hindujo minacis mizero de malsatego. Pro manko de manĝaĵoj kaj trinkaĵoj ĉiutage mortis miloj da homoj — precipe la suĉinfanoj mortis plej unue, ĉar la mamoj de la patrinoj ne plu donis lakton.

Por savi la popolon, la reĝo disdonis rizon el sia grenejo; tamen tio helpis preskaŭ nenion, ĉar la malfeliĉaj homoj nombris tro multe.

Iun tagon rapidis tri knabinetoj, ĉiu kun unu poto sur la ŝultro. La unua knabineto surhavis purpuran veston, la dua ruĝan kaj la tria grizan. La unua kaj dua knabinetoj rapidis kun tute gaja mieno, sed la lasta kun malvigla kaj malgaja mieno.

Kiam la tri knabinetoj iris tra densa arbaro, ili renkontis Budho, kun nuda kapo kaj nudaj piedoj.

„Amataj infanoj”, Budho demandis, „kien vi ĉiuj rapidas?”

„Mi volas iri por donaci al la malfeliĉaj homoj”, respondis la unua. „Mi kunportas poton plena de tute freŝa lakto.”

„Mi,” respondis la dua, „mi portas aroman supon.”

„Mi—mi—” la lasta knabineto respondis vemiene, „ĉar mi estas malriĉa kaj posedas nenion por donaci, mi ĉerpis akvon el fonto kaj alportis.”

Tion aŭdinte, Budho ekparolis admone: „Miaj infanoj, donaci al la aliuloj estas ja laŭdinda ago. Kiel ĝojos la malfeliĉaj homoj pro viaj donacoj! Sed karaj, la plej granda donaco estas ja, konstrui mondon, en kiu neniu bezonas donaci kaj neniu bezonas peti donacon! Amataj etulinoj, donaci al la aliuloj estas ja bonega ago, tamen tia donaco ne estas la plej granda donaco. Karaj infanoj, la plej grandan donacon povus fari la plej malriĉa persono en la mondo. Infanoj, ne fieru, nek hontu! Kiel ĝojos la malfeliĉaj homoj pro viaj donacoj!”

La tri knabinetoj kviete pluiris laŭ la vojo kun sampezaj potoj sur la ŝultroj.

Japanujo, Tokio.

El la japana S. NANYA.

Ĉiu, kiu varbas 5 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace „La Unuan Jarkolekton de „La Juna Vivo”. Do multvaloran libron de proksimume 200 paĝoj.

Se eksterlandanoj grupe abonas la gazeton, ili pagas nur la nederlandan abonprezon.

KORESPONDADRESOJ:

Al niaj abonantoj: Ĉiu abonanto, aŭ grupo, havas la rajton enpresigi senpagan korespondadreson unufoje en la jaro.

Ameriko: 16 jara knabo deziras korespondi kun aliaj knaboj en la tuta mondo. Certa respondo. Adreso: William Vathis, Lenigh Ave. Maŭch Chunk, Pa., U.S.A.

Anglujo: Mi deziras korespondi kun fraŭlinoj ĉiulandaj per il. poŝtk., leteroj, gazetoj, ktp. Mi estas 24 jara ĉarpentisto, kaj certe respondos al ĉiuj, kiuj ion sendis. Adreso: John. I. Andrew, 127 Railway St., Southport, Lanes.

Danujo: S.ro L. Jensen, Skallerup, Sollbjerg, Mors, deziras korespondi kun farmistoj el la tuta mondo.

Danujo: Geesperantistoj en kvin vilaĝoj deziras korespondi. Kolektas kaj interŝanĝas Esp-afojn, poŝtkartojn ilustritajn, Esp. glumarcojn kaj poŝtmarkojn: Bonvolu skribi al: „Ĉenero”, adr: Heinrich Michels, Skodborg J.

Hispanujo: 20-jara hispana samideano deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj, interŝanĝi ilustritajn gazetojn kaj bildojn. Adreso: M. F. Valdès, Plaza los Dolores No. 21, Callosa de Segura (Alicante).

Nederlando: Malgranda societo de kvar personoj deziras korespondi kun esperantistoj el ĉiuj landoj. Adreso: S.ro C. Stolk, Oude Dyk 116a, Rotterdam.

Nederlando: S.ro G. Maessen, Zandstr. 56, Montfort (L), deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Certe respondos.

Nederlando: W. Veldman, M. v. Coehoornstr. 34, Leeuwarden, deziras korespondi kun kapablaj Esperantistoj el la tuta mondo. Prefere kun Japanoj, Ĉinoj, kaj Aŭstralianoj. Mi garantias al ĉiuj respondon.

Nederlando: Ĉar mi intencas kunmeti Esp.-Albumon, mi petas la geesperantistojn ĉiulandajn, sendu al mi il. poŝtk. Mi nepre respondos sammaniere. Adreso: J. Fabrie, Voorhaven 15b, Rotterdamo.

Nederlando: K.do Th. Dinkla, 17-jara, deziras korespondi. Adreso: Zuiderweg 107, Z.O.-Beemster (post-Purmerend).

Nederlando: H. v. d. Hoek, legomkulturisto, deziras korespondi. Adreso: Nekkerweg 67, Beemster (post Purmerend).

Norvegujo: Mi deziras korespondi kun samideanoj en: Hungarujo, Polujo kaj Svislando. Instruisto T. K. Steinsland, Laudal apud Krs. Sand, S.

Svedujo: La geanoj de esp. grupo deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj. Respondojn sendu al: S.ro Sven Samelius, Ljugarn.

KURSGVIDANTOJ!!!

Vi deziras por viaj lernantoj mal-karan, praktikan esp. lego kaj lernolibron?

Mendu tuj la unuan, binditan jarkolekton de „La Juna Vivo”, (200 paĝa libro en arta kovrilo). La prezo estas nur: 1,6 Sv. fr. = 0,75 gld. Grupoj kaj abonantoj ricevas rabaton.

Kien iros la Nederlandanoj dum Pentekosto 1936? Al Gent, la interesa Flandra urbo, kie okazos la 7a. Flandra Kongreso.

Ĉu la Nederlandanoj konas jam la revuon „FLANDRA ESPERANTISFO?” Se ne, por 20 Belg. fr. = 1 gld. Vi povas ĝui ĝin, fariĝante abonanto.

JARKOTIZO.		
Ameriko	0,70 dol.	<p>Ĉu vi interesigas pri Svedlando kaj pri la sveda esperanto-movado? Se jes, nepre abonu la belan, ĉiumonate aperantan</p> <p style="text-align: center;">SVEDA ESPERANTO-GAZETO</p> <p style="text-align: center;">(prezo sv. kr. 3: por tuta jaro)</p> <p>Ĉiu numero ampleksas 16 paĝojn en formato 22 x 30 cm. Abonu jam nun por la jaro 1936 ĉe la eldonanto: Eldona Societo Esperanto, Stockholm I. Poŝtĉeka konto Stockholm n-ro 578.</p> <p>Katalogo pri esperantaj libroj estas senpage ricevota per peto ĉe la sama eldonejo.</p>
Aŭstrio	3,20 ŝil.	
Britujo	3 ŝil.	
Belgujo	17 fr.	
Ĉeĥoslovakujo	16.50 Kĉs.	
Danujo	3 kr.	
Estonio	2.50 est. kr.	
Germanujo	1.75 M.	
Hispanujo	5 pes.	
Latvio	2.10 l.	
Norvegujo	2.7 kr.	
Polujo	3.6 zl.	
Svedujo	2.70 kr.	

BONVOLU SENDI LA MONON POR „LA JUNA VIVO“:

Ameriko: Amerika Esperanto-Instituto, Madison, Wisc. Usono.

Anglujo: The British Esp. Association, Inc. 142 High Holborn, London W.C.1.

Aŭstrio: S.ro Scheibenreiter, Hermannsgasse 31/26, Wien VII.

Belgujo: Hendrik Rainson, Mechelen, Belga ĝironumero 335183.

Ĉeĥoslovakujo: L. J. Svoboda, Plzen „U Zvonu“, ĝironumero 14171 Praha.

Danujo: Sino M. Jensen, Galtrup, Erslev, ĝironumero 44593.

Estonio: Esperanto-Asocio de Estonio, Tallin, Poŝtkast 6.

Francujo: S.ro Matthieu, Dijon, 27, Place de la République, Côte d' Or.

Germanujo: Ewald Killmer, Schwabenweg 14, Wuppertal-Elberfeld. Germana ĝironumero: „Köln 104097“.

Hispanujo: S.ro Montserrat, str. Provenza 75, 2°, 3°, Barcelona.

Japanujo: S.ro Joshy H. Ishiguro, Daita 2—784, Setagaja, Tokio. Poŝtĉekkonto: Tokio 62061.

Jugoslavio: Vilim Buk, Knjiĝotiskara, Sl. Brod. Ĉeko Nro. 37.556.

Latvujo: Ludmila Jevsejeva, Riga, Reformiatoru, iela 14, dz. 5.

Svedujo: John Karlsson, Berga, Vasterhaninge. Sveda ĝironumero 72295.

Svisujo: S.ro R. A. Dasen, 19a Avenue Riant-Parc, Genève.

Ĉinujo: S.ro P. Ĉan, Ĉina Mondlingva Librejo. 15 Shang Sieh Chiaj, Peiping.

Oni povas pagi per eksterlanda poŝtmandato, **7 poŝtrespondkuponoj**, ĝirokonto, aŭ papermono en letero. Informiĝu en la poŝtofacejo, kio estas la plej malkara.

Subtenu La Junularlaboron, mendu viajn librojn ĉe le redakcio de „La Juna Vivo“! (Petu senpagan libro-liston!!)

*) Sendu nur monon al Svoboda, sed ĉiujn aliajn sciigojn al la redakcio.